4-a Jaro. N-o 183 APERAS SEMAJNE 5. Aprilo 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

KRIZO EN LA "ORA LANDO"

La guberniestro de Nov-Jorko, Smit, kiu kandidatas kiel prezidanto de la demokratoj, rajtigis la industri-komisaron de l' Nov-Jorka ŝtato entrepreni enketon pri la senlaboreco. Ties raporto nun estas aperigita kaj sciigas neatendite, ke Usono havas armeon el 4 milionoj da senlaboruloj. Kial Smit ekmemoris subite pri la senlaboruloj, estas demando por politikistoj. Liaj kontraŭuloj, precipe la respublikanoj, vidas en tio ruzan politikan agon. Ili opinias, ke Smit per tio volis gajni la laboristojn kaj disbati aliflanke la gravan pozicion de Kuliĝ (Coolidge) kaj la respublika partio. Ŝajne li volis pruvi, ke la prospereco, pri kiu la respublikanoj ĉiam fanfaronas, estas blufo, ke fakte regas terura krizo kaj senlaboreco.

Sed la persono de Smit ne interesas nin, nek liaj motivoj. Nin nur interesas la fakto de 4 milionoj da senlaboruloj en Usono. Industriaj krizoj ne estas novaĵo. La rado turniĝas supren kaj ree malsupren, kaj laŭ tiu turniĝado alternas prosperado kaj kriza stato. Tio estas malnova koncepto, kiun dum la lastaj jaroj en Usono oni ĉesis akcepti. Oni diris, ke krizoj estas kaŭzataj de tio, ke regas malzorga stato en la industrio. La produktado ne adaptiĝas al la merkato. En bonaj tempoj oni produktis tro multe da varo, ĝis la merkato estis superfluigata. Tio sekvigis, ke la fabrikoj komencis moderigi la prezojn. La malaltiĝo de la prezoj timigis la fabrikantojn, kaj ili ĉesis produkti fabrikaĵojn. La laboristoj ne plu povis aĉeti, kaj la prezoj ankoraŭ pli malaltiĝis.

Tiel okazis iam, oni diris. Sed hodiaŭ la industrioj estas gvidataj laŭorde. Oni montris la bonan laboron, kiun la komerc-ministro Huver faris sur tiu kampo. Li organizis la fabrikantojn de diversaj industrioj kaj ilin instruis, kiel reguligi sian produktadon laŭ la deziroj de la merkato. La bankoj emis pli enmiksiĝi en la aferoj de l' fabrikantoj. Ili atentis, ke la industrioj, al kiuj ili pruntedonas monon, kondutu severe laŭ bonnegocema maniero, malpli spekulacieme.

Sed tiuj belaj certigoj de optimistaj profetoj pri bonstato subite krevis. La krizo nun reganta estas unu el la plej seriozaj, kiujn ni havis. Kaj ĝia ĉefa kaŭzo estas la agado, per kiu oni volis neniigi ĉiujn krizojn. La provoj, ordigi la industrion kaj pli sistemigi ĝin, kreis la nunan situacion. Ĉar la rezulto de tiuj klopodoj estas, ke la fabrikoj bezonas malpli da laboristoj ol iam.

"Tribune" skribas en fruntartikolo pri la senlaboreco: "En la industrioj produktas la laboristoj nun pli multe ol antaŭe, ĉar ekzistas pli da kapitalo, kaj la fabrikoj estas pli science mastrumataj. Ni montru unu ekzemplon. En 1926 la vagonaroj de la lando veturigis ok milionojn da vagonoj da varo pli, ol en jaro 1920, kaj tamen montras la ciferoj de subŝtata komisaro, ke en 1926 la vagonaroj okupis kvaronmilionon da laboristoj malpli ol antaŭe."

En New Republic (Nova Respubliko) estas presita detala artikolo de profesoro, kiu indikas, ke de la jaro 1923 la nombro de laboristoj en fabrikoj ĉiam malpliiĝas kaj malpliiĝas. Dum kvar jaroj la laboristnombro en la fabrikoj malgrandiĝis je 15 elcentoj. Dum la pasinta jaro, 1926/27, la nombro de laboristoj malaltiĝis je 5%, en la sama tempo, kiam la fabrikoj plimultigis la produktadon. En kelkaj industrioj la produktado eĉ kreskis je 10%, kaj samtempe la nombro de okupataj laboristoj falis je 10%.

Tio okazis jam en tempo de plena produktado. Sed kio okazos, kiam la merkato postulos malpli da varo? — Kio okazas en la fabrikoj, tio okazas ankaŭ en la vilaĝoj. Ankaŭ tie oni trovas sciencajn rimedojn, por produkti pli per malpli da laborforto. Sed notinde estas, ke la farmisto nenion gajnas, dum la farm-laboristoj malgajnas. Kvankam la farmisto bezonas malpli da laboristoj, li ankoraŭ ne povas akiri ĉion necesan por la ekzisto. La situacio de la farmistoj kaj farmlaboristoj fariĝas pli malbona, kaj tio efikas sur la industrian situacion en la urboj. La stato de la urba Laboristaro sekve ankaŭ plimalboniĝas. Ĉar, kiam la farmisto en vilaĝo perlaboras malmulte, li aĉetas malmulte, kaj la fabriko devas por li pli malmulte produkti. Krome, multaj farmistoj forlasas la farmojn kaj venas urben por serĉi laboron. Ili pliigas la nombron de senlaboruloj, kaj la konkuro inter la senlaborularo pliakriĝas kaj maldolĉiĝas.

Laŭ la citita artikolo en New Republic depost 1923 tri milionoj kaj tricentmil farmistoj elmigris el vilaĝoj al urboj. Se oni aldonas ilin al la laboristoj elĵetitaj el la fabrikoj, oni komprenas la akrecon de la nuna krizo. La grava ŝanĝo en la industria vivo de la lando, la plibonigoj en administrado kaj maŝinoj, signifas por la laboristoj malbonon. Ili pagas la prezon per senlaboreco, malsato kaj mizero. H. R.

El pollanda gazeto esp-igis M. Ŝpetrik.

FAMA PATRIOTKADAVREJO: VERDUN

Mi volas rakonti al la Legantaro mian viziton al la iama batalfronto de Verdun. Ĉiuj scias, ke tiu urbo vidis en 1917 la plej teruran buĉadon, kian oni neniam antaŭe vidis sur nia planedo. Jen, kiel aspektas tiu regiono 10 jarojn post la buĉado.

Verdun mem estas preskaŭ tute rekonstruita. Nur la multaj tombejoj, kiuj ĉirkaŭas la urbon, atestas pri la buĉado. Tie la krucoj elkreskis po multaj miloj. La iama batalkampo, ankaŭ nomata "La ruĝa regiono", komenciĝas nur 3 kilometrojn distance de la urbnordo. Kiam la sciavidulo promenas de Verdun ĝis Douaumont (Duomon), pasante ĉe fortikaĵo kaj subtera fervojo de Tavanes, ĉe fortikaĵo de Vaux (Vo), kaj de Douaumont kaj la grandmonumenta ostejo pli malantaŭen al la bajonet-tranĉeo kaj la ŝtonminejo Autremont (Otremon), — terura vidaĵo aperas ankoraŭ nun al la okuloj de la turisto.



VERDUN. – Valeto de morto.

Ĉie la detruitaj kampoj prezentas kvazaŭ riproĉe siajn valetojn, krutaĵojn kaj montetojn, tute truitajn. La ekstermitaj arbaroj montras ankoraŭ siajn restaĵojn kun la ŝtipoj, elŝiritaj je 1,5 m. el la tero. Ĉie sur la kampoj oni ekvidas multege da militaĵoj: pafiloj, bajonetoj, grenadoj, dikaj kaj maldikaj kugloj, zonoj, ferteleroj, trinkujoj, ŝuoj, kąskoj, reloj, lignaĵaĉoj ktp. Kiam oni fosas nur 50 cm., oni ofte ektrovas kadavrojn, ĉu tutajn, ĉu pecojn. Ne malofte oni renkontas ostojn, multajn bestostojn, sed ofte ankaŭ homostojn. Ĉirkaŭ la fortikaĵoj ankoraŭ staras retoj el pikil-ferfadenoj.

Neniuj domoj aperas sur tiuj kampoj. Tute detruitaj estas la urbetoj Fleury (Fleri) kaj Douaumont. Neniuj muroj staras. Nur ŝtonaĵo miksita kun feraĵo, ledaĵo ktp. estas ankoraŭ videbla. Kiel solan konstruon oni rimarkas multajn monumentojn. Oni vidas: La Ostejo de Douaumont, la Bajonettranĉea monumento. Tiuj nomoj indikas, kie troviĝis la urbetoj Douaumont kaj Fleury, kaj oni tie konstruis monumenton. Dise, oni rimarkas tombojn kaj monumentetojn. Sed tio, kio frapas la okulojn, estas la grandega tombejo antaŭ la ostejmonumento de Douaumont.

Multaj homoj laboras tie, por serĉi metalaĵon, precipe kupron. Ili laboras en danĝero, meze de la militbuĉiloj. Laciga estas ilia laboro. Ili ricevas malaltajn salajrojn. Preskaŭ ĉiuj estas fremduloj, ĉu hispanoj, ĉu italoj, ĉinoj aŭ poloj k. a. Kiuj havas bonan ŝancon, ili povas akiri 30 ĝis 40 fr. po tago. Sed la plimulto akiras 15 ĝis 20 frankojn po tago. Ilia laboro konsistas el tio, fosi la kampojn por rikolti la pafaĵojn. Ofte ili fosas 80 centimetrojn profunden. Oni pagas al ili por kupro 3,5 fr. po kg. kaj 4 fr. po 100 kg. da feraĵo.

Ilia vivo estas kompreneble mizera. Kun sia familio ili loĝas en ligna kajuto antaŭ kaj maldekstre de la ostejo de Douaumont. Dume, niaj militprofituloj, tiuj el la dummilita tempo, kaj la postmilitaj, ĝuas arogante en siaj parazitpalacoj.

Mi nenion plu aldonas: la Legantaro mem juĝas kaj konkludas. (9344)

HENRI BARBUSSE

Eklumo en la abismo

Kun antaŭparolo de la aŭtoro al la esperanta eldono.

—o—

Sub la freŝaj impresoj de la mondmilito la fama aŭtoro verkis tiun ĉi plaĉe prezentitan 96-paĝan verketon. Forta protesto kontraŭ la milito, esploro de ĝiaj radikoj kaj pasia kulpigo al la kapitalista sistemo!

—o—

Ni rekomendas la libron varme al ĉiuj K-doj, kiuj iom perfektiĝis en nia lingvo kaj volas ĝui meditigan legaĵon.

Prezo: 0.80 mk. g.

Havebla ĉe Administrejo de SAT Leipzig O 27

Ibn Seud

Por helpi al la kompreno de la okazint-, ant-, ontaĵoj en Arabio, ni publikigas per la sekvantaj linioj kelkajn interesajn sciigojn pri la gvidanto de l' ribelantaj vahabitoj, la "liberigonto de Arabio". Red.

Abdul Ibn Seud estas unu el la plej orginalaj kaj konsiderindaj personoj de l' nuntempa Oriento. Lia regno etendiĝas hodiaŭ laŭlonge de la plej granda parto de l' Ruĝa Maro, de la golfo de Askaba ĝis la limoj de l' Jemen-regiono, de kie la limŝtonoj trapasas la dezerton ĝis Ojair kaj El Hasa, apud Persa golfo, tiam najbaras al Kovejt, suda Irako kaj orienta Transjordanio. En 1925 li venke militiris kontraŭ la malnova reĝo Husejn de l' Hedĵaz-regiono kaj detronigis lin, aneksante la landon. La ideo, kiun li de tuta vivaĝo persiste realigi celas, estas la starigo de tutaraba imperio. Unuafoje tio evidentiĝis jam en jaro 1910, dum la konflikto turkobalkana. Ĉiujn rimedojn li uzas, kiuj dum momento ŝajnas taŭgaj al li. Antaŭ 25 jaroj li helpis al Anglio en batalo kontraŭ la turkoj. Hodiaŭ li unuigas la gentojn por kontraŭbatali la britan imperion.

La fizionomio de Ibn Seud, kiu por la plej multaj inter ni ĝis nun ne estis pli ol nomo, estas desegnita al ni tre vive de vojaĝulo, Amine Rihani. Tiu lasta estas arabdevena, fariĝis kristano, usonano, kaj vizitis Ibn Seud en jaro 1922. Pri liaj impresoj li en tiu ĉi jaro eldonis libron.

Lia renkontiĝo okazis antaŭ la konkero de Hedĵaz per la vahabitoj, en dezerto de Nufud. "Ibn Seud, grandstatura, estas tre simpla en siaj moroj kaj vestaĵo. La oraj okulvitroj strange kontrastas kun lia burnuso. Li babilas en familiara tono, sidante sur ŝafa felo. Multaj malbonaj famoj pri mi atingis lin. Sed li ne atentas ilin, mem dezirante konvinkiĝi pri mia persono. Malkaŝe li parolas kun mi pri ĉio, faras min konfidulo de ĉiuj ajn imageblaj aferoj. Du esencajn aferojn li celas por sia ŝtato kaj popolo: la religion kaj la rajtojn hereditajn de la prapatroj."

Ekzistas malnova tradicia kredo vahabita. Ĝi estis fondita de Abdul Vahab en la 18-a jarcento kaj ne estis pure mahometana, sed kompromisema al idolana ideologio, en kiun refalis la popolamasoj dum mezepoko. Ibn Seud ekflamigis tiun malnovan vahabitan kredon, por starigi sian regnon, kaj la popolo restas plena de fido al li, religia kaj politika ĝia ĉefo. Ibn Seud estas forta, ĉar li respektas la "ulema" (mahometanajn teologojn), kaj tiuj siavice gardas, ke la popolo plenumu siajn religiajn devojn kaj pagu la imposton ("zakat").

La vahabita kredo baziĝas sur la litero de l' Korano kaj sur la "Sunna",

t. e. kolekto de kult-observoj de l' Profeto, kies ekzemplo devas esti sekvata zorgege. La vahabito rajtas kurbigi la frunton nur antaŭ Allaho, sekve ne rajtas kisi ies manon. Liaj moskeoj estas sen ornamaĵoj, li ne portas silkajn vestojn, neniam fumas, kaj neniaokaze rajtas kunigi alian nomon kun tiu de Allaho. Se iu malzorgas la preĝadon, oni lin avertas; se li rekulpiĝas, oni lin mortigas. Pekulo, kiu al si permesas fumi cigaredon, ankaŭ unue estas atentigata; se li rekomencas, la "ulema" lin bastonigas preskaŭ ĝismorte. Se oni kantas, se oni ridas tro laŭte en domo, la najbaroj vin ordonas ĉesigi tiun bruadon; novaj eksplodoj de gajeco sekvigas tujan punon.

Tia estas la vivo de l' "Akhvan"-oj aŭ Fratoj, almenaŭ laŭ la videblaj eksteraĵoj. Oni aldiras, ke kelkaj sekretaj diboĉoj estas la necesa kontraŭpezo al tiu ĉi sovaĝa puritanismo, kiun trudas la vahabita pastraro. Cetere, ili ekzercas sin por la milito, pensas pri proksima militiro kontraŭ la alikredanoj, de kie oni revenos kun pruvoj de kuraĝo kaj kun novaj riĉaĵoj.

Jen la bazoj de l' kredo de la subuloj de Ibn Seud: pura kaj simpla reveno al la tradicia doktrino, kaj ankaŭ miksaĵo de memestimego kaj humileco, de rezigno kaj de avideco, de malruzeco kaj de barbareco. "La 'ulema' estas la ŝimaĵo de l'araba scienco. La putraĵo de mortanta civilizacio en siaj malnoviĝintaj formoj" — konkludas la siria vojaĝanto. Kaj en la citita libro oni ne povas sin deteni konstati profundan reciprokan simpation inter la amerikanigita kaj kristanigita arabo, kiu vizitas Arabion, kaj la suvereno, kiu lin akceptas. Malgraŭ la distanco, kiu ilin disigas, ili estas proksimaj en la komuna malestimo kaj kompato por tiuj ĉi samrasanoj, kiuj trapenetrite de multcentjara nescio, sen alia risorto ol la fanatikismo, la avideco kaj la malamo, estas viktimoj de neŝanĝebla religio kaj de sufoka tradiciismo.



Faktoj sen komentoj

Oni sciigas el Barvahi, ŝtato Indore, ke la geedziĝo de l' usonanino f-ino Miller kun la eks-maharadĵo de Indore, s-o Tuhoji Rao, okazis la 17. 3. kun tre komplika ceremonio, kiu longe estas priskribita en la britaj ĵurnaloj. La amerikanino konvertiĝis al la budhismo kaj ricevis la nomon Davy (Devi) Ŝarmistha. Oni notas, ke la suma valoro de la juveloj, kiujn ŝi portis la tagon de la ceremonio, sub formo de tiaro, de braceletoj, de agrafoj kaj eĉ de ringo en la nazo, sumiĝas je 350 000 funtoj sterlingaj.

La grandaj eksterordinaraj memoferoj estas facilaj kaj preskaŭ bagatelaj kompare kun la malgrandaj ordinaraj kaj ĉiutagaj oferoj.

La disvastigo de la biblio ...

Kvankam la romkatolika eklezio komence nomis la presarton, eltrovitan de Gutenberg, "verko de diablo", ĝi tamen baldaŭ ekkonis la valoron de tiu diabla eltrovo por sia celo. La ĝis nun aperintaj religiaj presaĵoj estas legionoj. La ĉefverko de la krista religio, la biblio, estas tradukita kaj presita en multegaj lingvoj. Ekzistas kelkaj naciaj societoj, kiuj eldonas bibliojn. Interesaj estas informoj de la "Brita Biblia Societo" fondita en 1804. Ĝi raportas: "En 1825 la nombro de lingvoj, en kiujn la biblio tute aŭ parte estis tradukita kaj presita, estis 142. En 1875 tiu nombro kreskis ĝis 295. En 1895 ĝi atingis 326, kaj la tuta elspezo de la societo dum tiuj 90 jaroj estis 320 000 000 oraj frankoj. Fine en 1925 la societo posedis la sanktajn skribojn eldonitajn en 800 lingvoj kaj dialektoj, ankaŭ esperantlingve." — La eldonkvanto entute estas certe centoj da milionoj. La biblio estas donata en la manojn de infanoj, kvankam ĝi enhavas malmoralajn rakontojn, pro kio ĝi devus esti malpermesata. Sed en kapitalistaj landoj oni nur konfiskas literaturon socialistan, komunistan, ateistan, eĉ pacifistan.

... kaj de nia literaturo

La eldonkvanto de la marksista, ateista literaturo ĝis la milito estis kompare kun la disvastigo de la kontraŭa literaturo ankoraŭ malgrandega.

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

Provo

(Daŭrigo deknaŭa)

3-a ĉapitro

LA MODERNA PATRIOTISMO

La Nacio aŭ Patrio

Post la forfalo de l' Roma Imperio estis diversaj provoj pri restarigo de vasta politika unuo. Neniu sukcesis reatingi la staton, ekzistantan en la unuaj jarcentoj p. K.

Dum la t. n. Feŭda Reĝimo plej granda parto el Eŭropo estis en plena ĥaoso. Kio ĉefe karakterizis tiun epokon, estis la fakto, ke princoj, dukoj, baronoj kaj eĉ simplaj kavaliroj celis regi tute sendepende, ĉiu sur sia pli malpli granda bieno. Tiuj nobeloj plej ofte kondutis kiel rabistoj kaj priŝtelis vojaĝantojn kaj komercistojn. Tial la naskiĝanta burĝaro kaj la kamparanaro subtenis la klopodojn de reĝoj por limigi la "sendependecon" kaj arbitrecon de la nobeloj.

Estas vere, ke urboj povis ankaŭ stariĝi sendependaj kiel malgrandaj respublikoj. Kelkaj eĉ spertis grandan prosperecon. Tie ekfloris artoj kaj sciencoj, kiel en la antikvaj grekaj civitoj. Sed tiuj sendependaj ŝtatetoj ankaŭ batalis unuj kontraŭ aliajn, kaj finfine ili devis, kiel la nobeloj, rezigni sian sendependecon kaj eniri la kadron de pli granda politika unuo. Tiel kreiĝis reĝlandoj, kiuj konsistigis la ĝeneralan fizionomion de Eŭropo ĝis la Franca Revolucio, en 1789.

La povo de la reĝo estis senlima, tial ke li ricevis ĝin de dio mem kaj ne de la konsento de la regatoj. Tio evidentiĝis el la longdaŭra ceremonio, kiu okazis ĉe la konsekro de l' reĝo. Antaŭ ol ricevi la sanktan ŝmiraĵon, li estis kvazaŭ dormanta. La ekleziaj altranguloj vekis la elektiton kaj sciigis la volon de dio pri lia investado en la reĝan postenon. Estis kvazaŭ miraklo. Per tio la reĝo eĉ akiris la povon kuraci malsanulojn. Ekzemple, Ludoviko la 16-a, tiu sama, kies kolon oni fortranĉis pli poste, devis tuj post sia konsekrado, mantuŝi 2400 skrofolulojn! . . .

En la unua ĉapitro, ni jam vidis, ke post la aliiĝo de la primitivaj, senestraj klanoj, kiam naskiĝis la estreco, ĉi tiu lasta devis sin apogi ne nur sur ekonomia bazo (La potlaĥo), sed ankaŭ sur ia mistika forto per sankta malprofaniĝo en kunfrataro. La konsekrado al reĝo de ekleziaj altranguloj estis (ankoraŭ estas) la daŭrigo, sub pli pompa kaj aliigita formo, de la kutimoj ekzistantaj ĉe primitivaj triboj.

Ĉiam kaj ĉie ni do povas konstati la ekziston de du fortoj, kelkfoje inter si batalantaj[33]), kiuj direktas la historian evoluon. Unu rilatas al la teknika menso, devenanta el la neceso ĉasi, kapti, konstrui, inventi por vivi kaj fari la vivon pli kaj pli komforta; la alia rilatas al la mistika menso, kiu fantazie celas doni klarigojn pri la mondo.

Reĝlando fakte ne reprezentis teritorian kaj administran homogenecon. Ĝi estis stranga kuniĝo de feŭdoj sub sama reĝeco, kiu ofte rezultis el la hazardo de edziĝoj, de heredoj aŭ konkeroj.

Ne ekzistis naciaj armeoj. La reĝo plejparte uzis dungatojn por militi. Tial la regantoj ofte tute indiferentiĝis pri la venkoj aŭ malvenkoj de tiaj armeoj. Ekzemple, Volter povis

---

33) La longdaŭra batalo inter la papoj kaj la germanaj imperiestroj pro la investituroj dum la mezepoko estas pri tio tre trafa ekzemplo.

Tiu bedaŭrinda fakto estis kaŭzita per diversaj cirkonstancoj kiel: leĝaj malpermesoj, manko de financaj rimedoj, malinteresiĝo de la amasoj. Sed post la milito aperis en kelkaj landoj, speciale en Sovetio kaj Germanio, multe da libroj, broŝuroj, gazetoj kaj flugfolioj kun marksista, ateista kaj popularscienca enhavo. Estu nomataj kelkaj mondkonataj verkoj, kiuj estas disvastigataj tra tutmondo. Haeckel (Hekel), la enigmoj de la mondo (la germanlingva eldono atingis ĝis nun la eldonnombron de 420 000), Forel, la seksa demando, Corvin, la spegulo de la pastraro, Darwin (Darvin), la deveno de la homo.

Ĉiuj nomitaj verkoj aperis en kelkaj kulturlingvoj, parte en granda eldonkvanto. El la marksista literaturo la plej konata verko "La Komunista Manifesto" estas tradukita kaj presita en ĉiuj kulturlingvoj, ankaŭ en esperanto[1]). El la gazetliteraturo mi nomas krom la ruslingva ateista "Bezboĵnik" (Sendiulo), la germanan liberpensan gazeton "Der Freidenker" (La Liberpensulo), kiu aperas nuntempe en kvanto de 430 000. La gazeto "Arbeiter-Illustrierte" (Laborista Gazeto Ilustrita), aperanta en Berlino atingis la gigantan eldonkvanton de 1 300 000. La nomita gazeto estas disvastigata tra la tuta mondo kaj enhavas parte esperantan tekston.

K. Hubricht.

[1]) Havebla ĉe Admin. de SAT, Prezo: 0.60 mk. g.

Semajno el mia vivo

Mi estas 30-jara oficisto-statistikisto. La urbo, en kiu mi loĝas, havas nur 5000 loĝantojn, sed ĝi havas grandan politikan signifon kiel centro de Kara-Kalpakia aŭtonomia regiono. Ĉi tie pro la aŭtonomeco ne validas iuj leĝoj de l' cetera Sovetio. Ĉe ni la laboro en oficejoj komenciĝas je la oka horo kaj daŭras ĝis la dua, sen interrompo por la matenmanĝo. Tial mi devas ellitiĝi je la sepa, kaj estas duonhoron je dispono de mia edzino (kiu ankaŭ estas SAT-anino), por tetrinkadi. Dum ok minutoj mi piediras al la oficejo. Revenante hejmen mi tagmanĝas kaj kaŝiĝas en mia malluma ĉambreto pro la tagmeza varmego (60—70 °C). Nur je la kvina mi povas eliri al mia en la korto konstruita tendo el kano, kaj mi rekomencas la labortagon.

Mi posedas grandan scivolemon, sed ĉiam posedis ankaŭ malgrasan monujon. Estas certe, ke al tiuj homoj la sorto turniĝas dorse. Spite miaj longjaraj penadoj la supera lernejo min ĉiam malakceptis. Tial mi nun okupiĝas per memedukado. Ĉiusemajne mi regule dediĉas du vesperojn al lernado de agronomio, politikaj kaj ekonomiaj sciencoj kaj librotenado. Restas nur unu libera tago. Ĉe ni tio estas vendredo, ĉar la mahometanoj festas tiun tagon. La oficistaro kaj la butikistoj ripozas vendredon kaj laboras dimanĉe kiel kutime.

Vendredon mi instruas esperanton al mia edzino, tralegas la esp. gazetojn ricevitajn dum la semajno kaj respondas al miaj gekorespondantoj. Ĉar la poŝto trafas nian urbon tre neregule kaj malofte (1—3 foje dum monato), okazas iam, ke en tiu ĉi tago mi estas okupita ĝis kelkajn horojn post la noktomezo. Sed tiu tago ankaŭ faras al mi la plej grandan plezuron, ĉar multaj K-doj interesiĝas pri la vivo en Meza Azio, kaj mi, kiel vera SAT-ano, estas ĉiam preta kontentigi ilian sciamon.

A. Jadlovker (6771), Kazakstan, Turtkul.

Kongreso de Edukintern

en Leipzig (9.—14. aprilo 1928)

La Internacio de l' Eduklaboristoj organizos en Leipzig dum la Paska semajno "Pedagogiajn Tagojn" kaj Kongreson. La kunvenoj okazos en la ejo de la Unuiĝo de Leipzigaj Instruistoj. La 9-an de aprilo vespere okazos internacia amaskunveno en la Urba Ĉambro. La tagordo de la Pedagogiaj Tagoj estas jena: 1. La situacio materia morala kaj de l' Edukado, 2. Celo de l' Edukado, 3. Organizo de la lernejsistemo, 4. Programoj kaj Metodoj, 5. Disciplino ĉe lernantaro.

Edukintern estas tute unueca organizo kuniganta instruistajn sindikatojn el la diversaj prol. tendencoj. La Leipzigaj Pedagogiaj Tagoj estos grava manifesto por proletara unueco. Multaj Leipzigaj instruistoj firme promesis senpage loĝigi la eksterlandajn partoprenontojn. Sin turni al: Herm. Strobel, Leipzig N 22 E, Hartmannstr. 37. — SAT-edukistoj, partoprenu aŭ nepre sendu salutleteron al la Kongreso laŭ ĉi supra adreso.

La marta kajero de SENNACIECA REVUO (pedagogia) estas speciale dediĉita al la temoj pritraktotaj dum tiu Kongreso kaj al la celoj de Edukintern. Nepre havigu al vi tiun kajeron mendante ĉe la Administrejo de SAT! Prezo: 0,35 mk. g.

---

gratuli la reĝon de Prusio pro lia venko super la francaj armeoj. La fama verkisto ne kompromitis sian popularecon per tio. Tute male. Ne ekzistis tiutempe nacia, sed nur provinca patriotismo. Ne ekzistis ankoraŭ nacio.

La unua nacio, laŭ la moderna signifo de l' vorto, kreiĝis en Francio post la Revolucio. La feŭdaj rajtoj estis nuligataj; la kamparano, la metiisto, la burĝo akiris la plenan posedrajton de siaj bienoj aŭ entreprenoj. La senposedigitaj nobeloj kuniĝis kun la fremdaj princoj kaj provis restarigi la malnovan ordon. Ĉe tia danĝero la diversaj provincanoj forgesis pri dia aŭtonomio kaj solidare batalis por defendi la ĵus akiritajn rajtojn. Kiuj jam posedis bienojn, tiuj volonte soldatiĝis, aŭ instigis siajn filojn aliĝi la armeon. Sed ne ĉiuj civitanoj estis bienposedantoj. Por varbi la senbienulojn oni promesis al ili, ke tuj ĉe la fino de l' milito ili ricevos sian parton el la miliardo, kiun liveros la vendo de bienoj konfiskitaj al la forkurintaj nobeloj kaj al la Eklezio. La miliardo por la defendantoj de l' Patrio treege efikis sur la spiriton de la soldatoj el la unuaj revoluciaj armeoj. Kompreneble okazis, ĉefe en la urboj, multaj rekrutiĝoj nur pro entuziasmo por la libereco.

La konfiskitaj bienoj ne povis esti vendataj pro manko de aĉetantoj. La mono senvaloriĝis. Tial la miliardo ne povis esti pagata al la volontuloj. Sed ĉi tiuj lastaj ne forgesis la promeson. Pli ol unu fojon ili postulis la pagon. Babeuf utiligis tiun postulon en sia fama konspiro de la Egaluloj.

Francis Delaisi (Fransis Delezi), kiu mencias tiun fakton en sia libro "La Kontraŭecoj de l' moderna Mondo", donas jenan klarigon pri la tiutempaj militoj:

"Tial ke oni ne povis rehejmigi la soldatojn, ne doninte al ili bienon aŭ monon, oni daŭrigis la militon por ne malmobilizi. Ĉefe pro tio la packontrakto de Basel kaj tiu de Amiens (1801) estis nur interpacoj, kaj Napoleono povis senhalte konduki siajn venkantajn armeojn tra Eŭropo.

Post dudek jaroj, rezultis, ke ĉiuj malnovaj volontuloj estis mortigitaj, aŭ fariĝis generaloj, marŝaloj, eĉ reĝoj en Svedio, ĉe Napoli ktp. Kiuj ne scipovis legi, tiuj konsistigis la "grumblemulojn" de la malnova gvardio. Kiam Ludoviko la 18-a decidis pagi al la soldatoj nur duonan salajron, neniu plu pensis pri la promesoj de la Legislativo (Leĝdonanta Kunvenantaro). Ili tamen multe efikis sur la tutan eksteran politikon de la Konvencio kaj de la Imperio . . .

. . . Fundamente la tuta dramo de la Revolucio estis, je la vidpunkto de la amasoj, grandega penado daŭrigata dum kvarona jarcento por realigi novan agraran regularon, kiun ebligis la nuligo de feŭdaj rajtoj.

En 1792/95, ne plu estis armeo el "soldatoj", batalanta pro pago, por apartaj interesoj de princo. Ĝi estis armeo el civitanoj unuiĝintaj por defendi komunan grundon, kiu apartenis al ili, kaj kiun ili deziris translasi al siaj infanoj. Tio estas ĝuste la principo de la romana civito. Tial, tute nature, ili retrovis la antikvan esprimmanieron. Kaj jen super la duon-brigadoj de Hoche (Hoŝ) kaj de Marceau (Marso), resonas la malnova vorto, forgesita depost dudek jarcentoj, je kies nomo militiris la hoplitoj el Ateno kaj la romanaj legianoj: Filoj de la PATRIO, antaŭen!

Tiun tagon la Nacio anstataŭis la reĝlandon."

(Pluo sekvos) E. Lanti.

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

Artikoloj alvenadas. Multaj. Sed kiom da ili respondas al la postuloj de nia gazeto? Mi hodiaŭ ne parolu pri la teknika flanko, la skribarto, la lingvo, la stilo. Mi nur pensas pri la enhavo. La preferata speco de niaj verkantoj estas rakontoj. Pli malpli longaj. Pli malpli seriozaj. Por "La Lernanto" tre ofte ili estas tro longaj, por "Sennacieca Revuo" tro mallongaj aŭ negravaj. Ĉar "S. R." povas prezenti nur bukedon el plej elektitaj pecoj el proleta mondliteraturo.

Iuj opinias, ke rakontoj taŭgas por "S-ulo". Al ili ni volas memorigi, ke la materialo por "S-ulo" ne povas esti beletristika, sed nur informa, serva. Tiaspecajn artikolojn ni ĉiam bonvenigas. Ilin ni atendas de niaj K-doj. Verkante ili pensu ĉiam: ĉu tio estas interesa por la alilandaj legantoj? Ĉu mi prezentas ion novan, originalan al ili? Ekz., de usona laboristo ni ne volas scii, kiajn ideojn li havas pri soveta sistemo aŭ kiujn librojn li prefere legas. Ni volas scii de-li, kiel li vivas, kiel li laboras, kiom li salajras ktp.

Ni ĝojas pri aktiveco en kunlaborado al "S-ulo", K-doj; ĉar ĝi atestas la spiritan vivecon en nia Asocio. Sed ni deziras direkti vian aktivecon al la ĝusta vojo, por ke viaj produktoj ne trafu la paperkorbon... N. B.

NI FUNDE LERNU LA LINGVON

Jam multajn fojojn la Redaktejo de "S-ulo" atentigis pri fuŝskribitaj korespondaĵoj. Tamen denove alvenas malzorge skribitaj leteroj, pro kiuj la Redaktejo devas ĉiam kaj ĉiam admoni.

Sed la korespondado en fuŝa lingvo kun K-doj diverslandaj ankoraŭ pli malbonan efikon sekvigas. Komencante apliki esp-on, oni faru tion sub kontrolo de l' instruanto, donante al li sendotajn leterojn por korekto. Kaj oni korespondu memstare nur, kiam oni rimarkas ĉe si almenaŭ gramatikan senerarecon. Sed preferinde eĉ estas, ke oni korespondu nur post sufiĉa lertiĝo en stilo de la lingvo.

Se oni ne atentas tion, korespondante, oni neniam penos fundamente finlerni esp-on. Okazas, ke komencantaj korespondantoj ne rimarkas la gramatikajn erarojn de eĉ malnovaj esp-istoj, aŭ ial ne konsideras ilin eraroj, dum ili mem ne farus tiujn erarojn. Kiam mi demandis tiujn K-dojn, ĉu ili atentigis sian korespondanton pri la eraro, ili respondis: "Ĉu decas, ke mi al li parolu pri tio? Li ja estas kvin- aŭ dekoble pli malnova esp-isto ol mi." Kaj oni alkutimiĝas al la eraroj de siaj korespondantoj, opiniante, ke "ĝi taŭgas, ĉar ĝin skribis eksterlanda K-do."

Do pro tro frua apliko de la lingvo sen helpo de jam spertaj esp-istoj ni riskas ricevi armeon da malkorektuloj. Por eviti tion, oni devas plej zorgeme post studo de la kurso ellerni la lingvon laŭ libroj, gazetoj ktp. Necesas konstanta studado. La eraroj ofte estas kaŭzitaj de troa memfido. Kiom da erarplenaj leteroj restas nebone komprenataj! Pro tio kiom da vane perdataj tempo kaj energio! Tio malpliigas la valoron kaj intereson de l' korespondado. Mankas la intereso legi kaj traduki por nacilingva gazetaro fuŝskribitan leteron.

Tial mi ripetas, ke nia lingvo — "edukilo al sennaciismo" — tute ne povos plenumi sian taskon, se ĝi daŭre troviĝos en la manoj de malkorektuloj.

Ja plej bona ideo, esprimita per malbona lingvo, aperas jam iom malbonigita. — Ni atentigu niajn korespondantojn pri iliaj eraroj kaj korektu ilin, same kiel ni mem akceptu danke ĉiujn korektojn kaj instruojn.

Fine, por pli sukcesa kresko de nia movado, ni konsciu, ke ni devas lerni kaj lerni.

"Kiu ne lernadas, tiu mallernas."

V. Piskunov (5432).

NIA JARA KOTIZO

Sekve de la artikolo de nia Administranto en n-o 178 de "S-ulo" ni ricevis kelkajn leterojn pri la temo. Ili ĉiuj konsentas pri la plialtigo[1]). Kiel tipan ekzemplon ni publikigas jenan eltiron el unu el tiuj leteroj:

"Kiam mi antaŭ 1½ jaroj en Hungario aliĝis al SAT, mi jam tiutempe miris, kiom malalta estas nia jara kotizo. Kaj nun mi devas mencii, ke en tiu momento mi eĉ ne sciis, ke por la jarkotizo ni ricevos ankaŭ la Jarlibron. Mia miro estis granda, kaj kvankam mi estis senlabora dum multaj monatoj kaj devis nutradi kvarmembran familion, — jam el mia unua salajro mi sendis mian "ĉeneron" por la "Jubilea Ĉeno", cele subteni nian "S-ulo"-n. Mi sentis, ke mi fariĝis vera, fidela batalanto de la armeo de l' prolet-esperantistaro!

"Ĉiuj racie, prudente pensantaj K-doj devas konstati, ke nia kotizo vere estas tro malalta kaj la enspezoj ne povas ekvilibri la elspezojn. Nia "melkata bovino", la eldon-kooperativo, servu estonte ne por nura ebligo aperigi "S-ulo"-n, sed por teknika perfektigo, enhava riĉigo de nia ĵurnalo[2]).

"Mi plene akceptas la 33%-an plialtigon de nia jara kotizo, eĉ volonte estus pagonta kotizon, plialtigotan je 50%.

"Nia SAT-anaro devas esti la plej klaskonscia, gvidanta grupo de l' tutmonda esp-istaro. En necesaj okazoj ĝi devas esti model-donanta. La voĉo de la devo nun jam vokas nin. Do, montru ni bonan ekzemplon, estu ni oferemaj, sindonemaj!

"Nuntempe mi estas jam longajn monatojn elmigrinto kaj travivas vere malfacilan periodon, ĉar mia familio troviĝas en mizero kaj malproksime de mi. Mi mem estas malsana. Sub influo de l' administreja alvoko mi tamen denove kolektos miajn "ĉenerojn", ĉar nia tendaro devas disvastiĝi, fortiĝi, ĝiaj armiloj devas multobliĝi!" 7579.

NE TIEL PARTIEME!

Estas ofte tendenco de K-doj verkantaj artikolojn pri politiko kaj laborista movado por "S-ulo", klarigi ĉion laŭ unuflanka partia maniero, kaj kompreneble — laŭ partia vidpunkto de la verkinto. Ĉu tio vere povas utili al "Sennaciulo", mi forte dubas. "Sennaciulo" ne estas tendenca parti-propaganda ĵurnalo, sed laborista, peresperanta, ĝenerala klasbatala edukilo. Al siaj legantoj ĝi devas prezenti materialon, kiu konformiĝas al tiu spirito sinteza. — Leginte, ekzemple, artikolon de "Lodzano 10 750" en n-o 180 sub titolo "Antaŭ la balotoj en Polio", ni povas konkludi, ke la tuta malbono venas de Pilsudski kaj... bund-anoj (judaj socialistoj), kaj ke la lastaj estas nur krimuloj kaj denuncantoj. Mi tute ne estas "bundano". Temas ne nur pri bundanoj, sed pri ĉiu alia klasbatala partio. Ne sufiĉas, ke ĝi ne estu la partio de l' verkinto, por ĝin tiel "nigre" prezenti al la Legantaro de "S-ulo". Ni devas kutimiĝi ne nur al sennacieca, sed ankaŭ al pli kritikema kaj, se ne senpartia,

1) Kaj por sia propra celo, eldoni kolekton de literarturaĵoj. — Red.

2) Krom K-do 7972, Wels, kiu opinias, ke plialtigo de la kotizo sekvigos malpli multnombran aliĝon (aŭ eĉ eksiĝojn), pro senlaboreco ktp. Li tamen konsentas monsubtenon kaj eĉ instigas, ke oni en grupoj aranĝu "help-kasetojn" por SAT.

almenaŭ t o l e r e m a pens- kaj agadmaniero. Tiaspiritaj artikoloj havos pli da intereso, kaj la ĵurnalo multobligos sian valoron edukan kaj informan. Ni serĉu pli ofte la sintezon, ne devigante ĉiujn legantojn rigardi la mondon de faktoj tra koloritaj okulvitroj de iu partio, sed per malfermitaj okuloj, en la intereso de la tuta Proletaro.

J. Z. (6117).

R e d. n o t o. De K-do 5383 ni ankaŭ ricevis proteston pri la artikolo de Lodzano. Plie la protestanto demandas: "Kial vi konsentis enmeti artikolon, kiu entenas malĝustajn atakojn kontraŭ lab. partio?" Nu, simple tial ke, ĉe tro rapida legado, mi ne atentis, ke "Bund" estas la partio de judaj laboristoj kaj transdonis la manuskripton al la Redaktoro por prilaboro. De nun ni tre atentos la skribaĵojn de K-do Lodzano, kaj ni certe metos ilin en paperkorbon, se ili denove entenas insultojn kontraŭ lab. partioj. Ĉi okaze ni ree alvoku al niaj korespondantoj, ke ili ne forgesu, ke "S-ulo" estas superpartia organo, kiu devas nur objektive informi kaj ne tendence kaj malvere raporti.

E. L.

PRI TURISTA FAKO

Estus plej maltrafa entrepreno, se efektiviĝus intenco de K-do Semjonov (esprimita en n-o 176), eldoni propran esp-lingvan turistan presorganon. Kelkaj tiaj entreprenoj (tute kompreneble) jam fiaskis. Sed tasko de la turistoj estas, nepre pere de esp-o kolekti materialon, kiun ili poste liveru al naciaj turist-organizoj laboristaj. Krome mi tute konsentas, ke de tempo al tempo aperu ankaŭ speciala turista paĝo en "S-ulo". Sed oni nepre ne efektivigu aperigon de propra presorgano. Estus certe trafa ago, se por viaj celoj vi utiligus la Esp.-Servon de SAT, kiu ankaŭ de tempo al tempo povus liveri turistajn planojn ktp. al regionaj gazetservantoj, kiuj siavice devus peri tiajn planojn al siaregionaj turistaj organizoj en nacia lingvo. Jen, propono por pliintensigi nian peresp-an servadon al laborista organizo.

Ĝenerale mi ankoraŭ diru, ke la unua kaj plej grava laboro nature restu por ĉiam, nia varbado inter la unuopaj proletoj en fabrikoj, organizoj, kluboj ktp. Ankaŭ ni ne malatentu la interesigon de gvidantaj Gek-doj pri nia lingvo, kiuj povas utili al nia movado.

(715)

HISTORIO DE LA LABORISTA ESP. MOVADO

La kompilanto de tiu gravega verko, kies aperigo forigos ofte senteblan mankon en nia literaturo, **refoje alvokas** ĉiujn K-dojn, kiuj povas liveri informojn k. materialon laŭcelan, ke ili **senprokraste** plenumu tiun taskon. Ĝis nun el kelkaj gravaj landoj mankas la informoj. Ĉu ni eldonu nekompletaĵon? Rapidu! Ĉion adresu al K-do G. P. d e B r u i n, Twekkelerweg H. 187 g, L o n n e k e r bij Enschede, Nederl.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Germanio. N o v a v e s (ap. Berlin). 4. marto okazis inaŭguro de esp. standardo por nia grupo, kiu ekzistas de majo 1926. La grupo posedas bonan bibliotekon k. estas unu el la plej laboremaj de l' distrikto Berlin-Brandenburg-Lausitz. Ĝi kolektis por standardo inter la membroj 200 gmk. (Kiom por SAT-kooperativo? — R e d.) Post kunveno de LEA-distrikto ĉiuj Gek-doj marŝis tra la stratoj al inaŭgurejo, kie multaj gastoj, ankaŭ burĝaj esp-istoj, ĉeestis la feston. Partoprenis virĥoro, deklamantoj, paroladantoj (K-do Schulz por la grupo, K-do Vildebrand-Berlin; dir. Glück k. reprez. de gr. Potsdam por la burĝa movado). Multaj salutlet. el ĉiuj landoj estis ricevitaj (laŭeble ni resp. al ĉiuj). Ĉiuj gazetoj raportis pri la soleno, bonsukcesa ankaŭ de propag. vidpunkto. Eksterl. K-doj vizitontaj Berlinon, ne forgesu nian grupon! — L a b. E s p. G r u p o "Ni estu fratoj", N. — **Sovetio.** K o ĥ m a. SEU klopodas nomigi ĉefan placon je nomo de D-ro Zamenhof. Kursoj okazas kun 30 lern. Ili daŭras 2 jarojn. — K r e m e n ĉ u g. Novaj rondetoj ĉe fervojista klubo "Lenin" (gvid. K-do Ŝlipper), ĉe X-a regimento por ruĝarmeanoj (K-dino Moskina), 3-a tabakfabriko (K-do Perelman), kursoj de IRH-aktivuloj (K-dino Izgur). Gravaj kursoj ĉe Pedag. Teknikumo por 80 stud. (gvid. K-do E. Izgur) k. Vespera Universitato por 25 stud. (K-do M. Izgur). — K r j u k o v (Dnepro). Novaj porfervojistaj rondetoj dank' al la aktiveco de Gek-doj Krivopljas, Humenjuk, Ŝkarbatova, Floŝev. — J a r o s l a v l. Dum feb. K-do Lingel raportis pri esp. en 9 div. kluboj, ruĝaj anguletoj k. lernejoj. Aŭskultis 1460 pers. Rezulte 3 rondetoj po 50 p. (gvid. Lingel). 5087. — L e n i n g r a d. Funkcias nun 46 rondetoj, kie laboristoj k. oficistoj lernas. Dum nuna vintra sezono okazis multaj raportoj pri esp., ĉeestis ilin entute 4000 pers. Ne delonge organizita "ekspozicio de intern. interligo" havas grandan sukceson. Ankaŭ ĉe IRH-gub. organizo oni sukcese agadas. Dum nur 2 semajnoj IRH-ĉeloj sendis 20 let. al alilandaj RH-ĉeloj k. al enkarcerigitaj K-doj. Radiostacio legigis artikolon pri esp. En leningr. ŝtata universitato oni organizis kurson pri int. lingvo k. esp. — P. T i l i n (9310). — **Svedio.** M a l m ö. Oni fondis esp. klubon de laboristoj kun 45 membroj. Funkcias 5 studrondoj en esp. 5. 1. okazis festo kun parolado k. teatroludo; same 4. 2. Ĉeestis 100 pers. (Laŭ Svensk. Arb. Esp.).

Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante p l i b o n i ĝ a d i kaj p e r f e k t i ĝ a d i; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga r o m p a d o kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo n a t u r a, senkonfuza kaj sendanĝera.

L. L. Z a m e n h o f (F u n d a m e n t o d e E s p e r a n t o, havebla ĉe nia Administracio).

La Lingva Angulo

Ĝenerala rimarkigo. Ĉiujn demandojn, kiuj rilatas al Vortaro kaj estas klarigataj en la Vortaro de KABE, ni ne respondas ĉi tie.

Demandoj:

1. Ĉu formo "ekŝanceligi" ĉiam estas erara? (Vidu L. Ang. en n-o 169). Ĉu esprimoj: "ekŝanceligi, vidigi, kaptigi, metigi" k. s. ne signifas "igi iun ekŝanceli, vidi, kapti, meti ion? (4608)

2. Kia diferenco estas inter "konfuzi, konfuziĝi, konfuzigi"?

3. Kia diferenco estas inter "ekbruli, ekbruligi, ekbruliĝi"?

4. Kia diferenco estas inter "enloĝiĝi, enloĝi, enloĝigi"? (7338)

5. Ĉu oni povas uzi "ĝis (kiam)" en la sama senco kiel "dum", ekz. en la frazo ("S-ulo" n-o 159, pĝ. 22) "Sed liberpensuloj ĉie estas kaj estos maltoleremaj ĝis (kiam) homaro **ne** staros tiom alte, kiom sennaciularo"?

(7145.)

Respondoj:

1. Oni povas kunligi transitivajn formojn kun "ig" teorie ĉe ĉiuj verboj; praktike oni ofte devas preferi alian formon, por ne malklarigi la sencon. Ekz. la de vi citita "A. ekŝanceligis Petron la arbon" estas tute malkonsilinda pro la duobla akuzativo, kiu malklarigas la sencon. Ankaŭ "A. ekŝanceligis al P. la arbon" estas malklara. Sekve, praktike la formo "ekŝanceligi" estas nekorekta. Krome temis konstati, ke "ŝanceli" estas transitiva formo, kion la K-doj ofte malmemoras. Kompreneble frazoj kun "vidigi, irigi" ktp. estas klarsencaj kaj uzindaj: Ekz. "mi vidigas al P. la ĝardenon" aŭ "mi irigas Petron al la muro". (Oni nepre ĉiam evitu la duoblan akuzativon, eĉ se ĝi gramatike estas pravigebla).

2. K o n f u z i estas transitiva verbo. Ekz.: Mi konfuzis lin per akraj paroloj. K o n f u z i ĝ i estas la netransitiva formo. Ekz.: "Li konfuziĝis, aŭdante la akrajn parolojn." Pri "konfuzigi" legu la resp. al 1. Ekz.: "Mi konfuzigis Petron per la akraj paroloj de mia amiko", tio signifas: "mi Petron igis konfuza per . . ." Prefere oni diru: "Mi instigis mian amikon, per akraj paroloj konfuzi Petron."

3. B r u l i estas netransitiva verbo. Ekz.: "La domo (ek)brulas" (signifas: la domo s u f e r a s ion, sed ne a g a s). Sed: "mi ekbruligas la domon." (i g i faras la verbon "bruli" transitiva.) — La formo e k b r u l i ĝ a s estas evitinda, ĉar "ek" jam esprimas "veni en staton de", sekve "iĝ" ne plu esprimas novan nuancon.

4. Komparu la antaŭajn resp. La verbo l o ĝ i estas netransitiva, ĉar ĝi esprimas s t a t o n. "Mi loĝas en domo" signifas staton de loĝado. (Oni ankaŭ povas diri: Mi [en]loĝas

domon“; tiuokaze la akuzativo nur anstataŭas la prepozicion “en“, sed ne rilatas al la karaktero de l’ verbo “loĝi“. Sed ni malrekomendas en tiu ĉi frazo la akuz. formon, kvankam ĝi estas gramatike korekta. Ĝi estas neklara.) Por, esprimi movon, ni do laŭsence bezonas la sufiksojn “ig“ aŭ “iĝ“. Mi enloĝiĝas domon (rilatas al la subjekto “mi“), kaj “mi (en)-loĝigas Petron en domon (rilatas al la objekto, Petro). Interimo.

5. Ne. Ambaŭ vortoj (uzataj prepozicie kaj konjunkcie) havas nur unu sencon, kaj oni ne povas interŝanĝi ilin. Anstataŭ “ĝis kiam“ oni pli simple uzu nur “ĝis“, ĉar plej ofte ĝi sufiĉas por la klareco de frazo. En la citita frazo oni devas forstreki la vorteton **ne** kiel eraran. Korekta tiu vorteto nur estus, se ni anstataŭas “ĝis kiam“ en la frazo per“... tiel longe, kiel (homaro **ne** staros...)“. “Dum“ oni en tiu ĉi okazo ne povas uzi, ĉar ĝi havas alian sencon; sed uzebla estas la formo “antaŭ ol“ anstataŭ “ĝis (kiam)“, en la sama senco (sen postsekvanta “ne“).



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Esperanto-Russkij Slovarj, de V. Sutkovoj. Eldonejo Izdanije CK. SEU, Moskva 1928, pĝ. 213, 11×15 cm. Prezo nemontrita.

La vortaro estas tre bone prezentita. La vortoj de Universala Vortaro estas presitaj per grandliteroj, tiuj de Oficialaj Aldonoj signitaj per ciferoj k. la neoficialaj per steleto.

Ni bedaŭras, ke la aŭtoro enkondukas kelkajn strangaĵojn laŭ sia persona prefero: anke, ante, ankor(e). Se ĉiu volos nepre trudi kontraŭ fundamentajn formojn, ni bele aspektos. Ian tagon espereble ni trovos iun, kiu enkondukos — laŭ la § 15 de la Fundamento kompreneble! — matro, kiu krom la internacieco povas sin defendi per la — egaleco de seksoj. Kaj fine ĉu formoj kiel ankaŭ, antaŭ ne estas pli belsonaj, ol la polaj, senfortaj ante, anke? Sed por tion senti oni devas havi — orelon kaj due respekton al nia vivanta lingvo. Ni ankaŭ bedaŭras, ke la aŭtoro tro forigas ĥ, kiu ja troviĝas en tiom da lingvoj! S. G. K.

Kvin esp. Ŝlosiloj eldonitaj laŭ nova normo k. sub la aŭspicioj de la Int. C. K. de la esp. movado. Germana (eld. Ellersiek & Borel, Berlin), itala (eld. A. Paolet, San Vito al Tagliamento), juda (eld. I. Ŝapiro, Bialistok, Polio), nederlanda (eld. H. Blok, Amsterdam), sveda (eld. Eld. Esp. Societo, Stockholm). Prezoj: 10 fg., 30 cent., 20 ct., 7½ ct., 10 œroj.

Ŝlosiloj alilingvaj sekvos. Ili diferencas de la pli fruaj per kovrilo kun nova tekstaranĝo k. per la kompletigo per tabelo de korelativaj vortoj k. komerca vortareto. I. A. la adresoj de la koncernaj naciaj Lab. esp. societoj estas konigitaj sur kovrila paĝo. Formato k. malpezo same kiel antaŭe.

Kiel oni malŝparas tempon kaj energion

El dagestana vilaĝo (Kaŭkazio)

La vivo spite la bela naturo estas sufiĉe sovaĝa kaj enuiga. La pleĵ malfacila afero estas la lingva demando. Dum kelkaj monatoj interrilati kun la mondo nur per tradukanto, nenion kompreni el ĉirkaŭanta vin mondo sen lingvo, jen estas vera torturo. Mi dezirus esperantigi miajn lernantojn, sed mi timas pri iliaj kapoj; ĉar la lernantoj jam studas rusan, darginan, turkan lingvojn. Mi devis iom prokrasti esp. laboron, por ne fari el nia lernejo lingvistikan instituton... Kvankam mi volonte anstataŭus ĉiujn tri lingvojn per unu — esperanto. Ni jam staras ĉi tie sur la vojo al esperanto, ĉar baldaŭ dagestanaj lingvoj transiros al latina alfabeto.

Malrapide fluas tie ĉi la vivo, ankaŭ la pensado ne rapidas. Ĉirkaŭitaj de altegaj montoj la enloĝantoj malmulte pensas pri cetra mondo, Ili fervore kliniĝas antaŭ “Alla“ kaj eĉ ne intencas ŝanĝi sian vivmanieron. Feliĉa, idiota vivo. Lernejo, kooperativo kaj aliaj novaĵoj de soveta tempo nur malmulte vekis ilin. Nur la junularo iom post iom sovetiĝas. 4544.

SENNACIECA REVUO

regule aperas ĉiumonate!

Pro la malfruiĝoj en la aperado de “S. R.“ dum la lasta tempo la Revuo perdis multajn abonantojn. Ni povas certigi al la Legantaro, ke hodiaŭ ne plu ekzistas la kaŭzoj de prokrasto. **“S. R.“ de nun tute akurate aperos** kaj estos liverata al siaj amikoj. Ne nur al la malnovaj abonintoj ni direktas la peton reaboni la Revuon, sed ni ankaŭ **deziras akiri multajn novajn legantojn** inter la amikoj de

Literaturo — Scienco — Pedagogio

Enhavo de la marta kajero

(Edukada serio)

M. Van de Moortel: Semajno de Edukintern en Leipzig. — Celo de l’ Edukado. — **Céléstin Freinet:** La problemo pri lerneja disciplino. — **Edukintern:** Statutaro. — **M. Boubou:** Internacio de l’Eduklaboristoj (rapida historia skizo). **L. Vernochet:** De Bordeaux ĝis Leipzig. **T. Oki:** Situacio de prolet-infanoj en Japanio kaj Ĉinio.

IRH-anoj, atentu!

La Distrikta Komitato de IRH. (MOPR), ĝiaj ĉeloj kaj ties anoj dez. koresp. kun IRH-organizoj kaj membroj pri IRH-laboro kaj kun politikaj malliberuloj pri ilia vivo. Samtempe la k-to petas pri alsendo de IRH-fotoj, revuoj, afiŝoj kun nepra esp. traduko por IRH-ekspozicio. Al sendontoj antaŭdankon. Adreso: **Ĉita (Siberio), Zejskaja N 17, Okruĵkom (MOPR).**



Kongresmarko farita laŭ desegnaĵo de K-do Gunnar Torstensson.

Havebla ĉe la Kongres-Komitato.

ĜUSTIGO

La redaktoro bonintence (n-o 181, p. 199, lasta linio 2-a kolono) ŝanĝis “minis“ al “ĉizis“. Sed kompreneble oni ne povas ĉizi ŝtonon silikan per korno de l’ cervo. Vere tie en Thetford la prahomo havis malprofundan ŝakton kaj en speciala tavolo subtere minis silikŝtonojn por siaj iloj. Ĝenerale la redaktoraj ŝanĝoj plibonigas, sed tiun ĉi fojon ne. (488)

K-do 488 mem kulpas pri tiu malkorektaĵo. La redaktoro ne komprenis la frazon enhavantan la vorton “mini“, kiu fakte ne havas sencon (mini = esti mino). Sekve li ne povis prezenti ĝin al la Legantaro kaj anstataŭis ĝin per alia. Laŭ la supra klarigo kredeble “elfosi“ estus laŭsenca. Ni profitu la okazon, por atentigi ĉiujn K-dojn, kiuj verkas por “S-ulo“, tre bone pripensi la uzatajn terminojn, por eviti erarkomprenojn. Red.

ADRESŜANĜO

La **Pariza Lab. Esp. Klubo** troviĝas nun en **44, Rue Claude Vellefaux.** Korespondantoj! Nepre notu! La malnova adreso ne plu validas.

Junlaboristoj kaj komjunuloj!

La Distrikta kaj Urba Komjunular-Komitatoj, multaj komjunular-ĉeloj, junpioniraj taĉmentoj k. unuopaj komjunuloj dez. koresp. kun alilandaj junlaboristoj k. junkomunistoj k. ties organizoj pri junlaborista, komjunulara k. kominfana vivo, laboro, organizoj k. batalo kontraŭ kapitalista sociordo, ankaŭ pri metodoj de porinternaciisma edukado. La anonco validas unu jaron. Resp. garantiata. Adr. **Ĉita (Siberio), poŝtkesto N 1,** por...

TRANĈILLABORISTOJ EL ĈIUJ LANDOJ

Por starigi korespondadon inter la samprofesianoj, sendu adresojn kaj detalojn pri salajro k. vivkondiĉoj al la Peranto de la SAT-rondo **Solingen.** Adr.: **K-do Erwin Schmitz, Solingen (Germ.), Milchstr. 62.** Respondas tuj.

Tutmonda prolet-infanaro atentu!

Ĉu vi jam sendis let. al Kievaj pioniroj? Nepre skribu! — Kievaj pioniraj taĉmentoj dez. koresp. kun pioniraj organizoj k. prol. infan-grupoj el tuta mondo. Skribu multnombre! Resp. garantiata. Adr.: **al Petrovski Rajkom LKSMU, por pioniroj, Borisoglebska str. 2, Kiev (USSR).**

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":
New-Yorker Volkszeitung, 1. 2. (Kvar taskoj — Drezen). Kiir (Radio), Tallinn, 4. 4. 27, Striko en Turkio, Let. el Persio; 11. 2. 28, El Hung.; 10. 3., Klasbat. en Jap.

Represis el "La Lernanto":
Punalippu (Ruĝa flago) Porinfana gaz., Helsinki, marto. Kiel laboras mia pionirtaĉmento (feb.).

Priesperantajn art. k. notojn enhavis:
Daily Herald, London, 16. 3. (ankaŭ pri "S-ulo" n-o 179); PAX, Paris, 16. 3., du art.; Punalippu, Helsinki, marto; Sächs. Arbeiter-Zeitung, Leipzig, 14. 3., el Riesa; New-Yorker Volkszeitung, 30. 1.; Der Deutsche Eisenbahner (Germ. fervojisto), Berlin, 11. 3.

Pri SAT k. la Kongreso enpresis:
El Socialista, Madrid, 13. 3.; Social-Demokraten, Stockholm, 18. 3.

NIA POŜTO

5432. — Sen la muziko la versetoj neniom valoras. Kontrolu aŭ kontroligu laŭ la ritma akurateco vian tradukon.

10 142. — Atentu la unuan el la "dek devoj" en marta "La Lern.". Vi metis al vi tro malfacilan taskon.

5323. — Ni utiligas 1. k. 3.; la duan nur en okazo de bezono.

4983. — Ne povas enmeti senpage.

Al kelkaj. — N-oj 175, 177, 181 k. 182 ne plu estas haveblaj.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Bulgario.

K-do Georgi Atanasov, (junulo) 141/VI, Gorna-Ĝumaja, dez. koresp. kĉl.

Francio.

Adresŝanĝo. K-do L. Chaussade, 35, Rue St. Georges, Lyon, 5 (stratŝanĝo).

Adresŝanĝo. K-do Niko Smit forlasis Parizon. Nuna adreso: Kromme pad 5, Laren (N. H.), Nederl. Dez. koresp. pri sociaj temoj kun ĉiul. K-doj.

Germanio.

— 20 gelernantoj dez. interŝ. PI, PM kĉl. preferinde kun gelernantoj. Adr.: K-do Hellmut Otto, Naturheilgarten, Neukirchen i. Erzgeb.

— Kelkaj membroj de nia grupo dez. interŝ. L, PI, kĉl. Adr.: "Lab. Esperanto Grupo", Oelsnitzer Str. 107/1, Hof i. Bay.

— Komencanto (sportulo) dez. koresp. kun Moskvaj sportuloj pro partopreno de la Spartakiado. Resp. garantiata. Skribu al: K-do Richard Knappe, Heidenauer Str. 12, Dresden-A. 21.

K-do Hans Gerber, Johannisvorstadt, 1, Altenburg i. Th., dez., koresp. kun amator-pentristoj, interŝ. PM k. artaj PK. Tuja resp.

— Esp.-kurso en lab. gimnast-unuiĝo serĉas kolektivan korespadon kĉl. L, PI, pref. kun esp. kursoj aŭ grupoj. Adr.: K. Bärthel (por esp. kurso), Katharinenstr. 9, Buchholz i. Sa. — Ni nepre resp.

Jugoslavio.

K-do Stefano Fure (brosisto), Cara Dušana, 12, Veliki-Beĉkerek, dez. koresp., precipe kun aŭstrianoj k. germanianoj pri fakaj problemoj.

K-do Andrija Miŝak (tipografisto), Radniĉki dol. 53, Zagreb, dez. daŭre koresp. kun samfakuloj pri kleriga laboro inter la laboristoj, L, PI, Certe resp.

Hispanio.

— Jenaj K-doj en Tarrasa (Katalunio), dez. koresp.:
Sebastian Chaler, Str. Sn. Mariano 124;
Iaime Panés, Str. Sn. Lorenzo 95;
Ramon Closa, Str. Sn. Guirico 68;
Francisco Dalman, Str. Mina 26;
Jacinto Vita, Str. Carretera Rellinàs 44;
Josep Peirô, Str. Prim 129;
Julio Cardenal, Str. San Isidro 67-1º;
Antono Costa, Str. Salmeron 98;
Francisco Vila, Str. Carretera Rellinàs 44;
Vicente Tosea, Str. Norte 64.

Nederlando.

Adresŝanĝo. K-do G. P. de Bruin (Enschede), nun loĝas: Twekkelerweg, H. 187 g., Lonneker bij Enschede. **(Ne dez. korespondi.)**

Sovetio.

K-do Arkadio Virviĉ (junkomunisto), Puŝkinskaja 9, kv. 3, Pskov, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. L, PK, PI, PM, bfl.

K-do S. Bojev (studento), Vet-Instituto, Saratov, serĉas seriozan koresp-adon, preferinde studentojn; interesajn let. uzas en studenta murgazeto. Somere loĝas en Aŝhabad, ul. Svobodi 2 (Mez-Azio).

K-do Edraki Zejnalov, ul. Jukovskaja 19, Aŝkabad (Turkmenistanio) dez. koresp. pri div. temoj kĉl.

K-do Ignaco Galaktionov, Centra Lab. Klubo, Porhov, Pskov. gub., dez. koresp. kĉl. L, PK, PI, nur pri lab. movado k. klasbatalo. Resp. garantiata.

ATENTU!

Esperantista rondeto ĉe Klubo de metalistoj serĉas korespondantojn, rondetojn kaj grupojn ekster Sovetio. Ni korespondas pri kluba vivo, klerig-laboro, politikaj aferoj, laborista vivo kaj sporto. Respondo garantiata. Adr.:

Kamenskoje, Dnjprp. okr. (Sovetio)
Klubo "Ŝevcenko" por Esp-o-Rondo

— Interligilo de la PTT-ĉelo de SEU ĉe Teĥnikumo de Ligilo, dez. koresp. kĉl. kun Radioamatoroj, oficistoj de telefono k. telegrafo. Adr.: Ĉelo de SEU Teĥnikumo de Ligilo, Gorohovskaja 16, Moskvo.

— Kursanoj-konstrudesegnistoj dez. korespondi kĉl. pri desegnarto, lab. movado k. a. temoj. Resp. garantiata. Adr.: K-do N. Rikov, Sretenka, 27/29, Gos. Kursi Ĉertejn. — Konsruktorov, Moskvo.

K-doj A. k. L. Baŝev, Nijne-Siromiatniĉeskaja d. 5, kv. 66, Moskvo, dez. interŝ. PK, kĉl. Resp. garantiata.

— Jenaj Gek-doj el Ivanovo-Voznesensk deziras korespondi kĉl. pri div. temoj L, PK, PI: Paŭlo Fr. Neĉvalenko, Afanasjevskaja 37; A. Paramonov, 2-a Ilinskaja 32; Mikaelo Sorokin, Ŝtaro Ikonnikovo 22/2, Spiridonova; Viktor Zvorikin, fabriko BIVM, Buro uĉeta materialov; Aleksandra Teofanova, fabriko BIVM, Buro uĉeta materialov.

K-do A. Jadlovker, Turtkul, Kazakstan, dez. koresp. kun Radio- k. fotoamatoroj. Resp. estas ĉiam garantiata. Skribu multnombre! Interŝ. jurn., il. gaz. k. esp-aĵojn.

— Esp. rondeto el laboristoj de marfabriko, dez. koresp. pri lab. k. socia vivoj kun apartaj laboristoj k. organizoj. Adr.: Sebastopolo, Morzavod, Esperanto-Rondeto.

SOCIALISTOJ, ATENTU!

La 1-an de majo aperos la unua numero de "Le Jeune Socialiste" (Juna Socialisto), organo de Belga Federacio de Soc. Jungardistoj. Por apogi niajn poresp. klopodojn, salutu, el ĉie, la novan gazeton per esp. letero. Adreso: **"Le Jeune Socialiste", 28, rue Haute, Bruxelles (Belgio).** SAT-ano 155.

La blankrusia edukista gazeto ASJVETA intencas aperigi ĉiumonate esp. resumon laŭ la modelo de la esp. resumo de l' ukrainia gazeto "Vojo de Klerigo". La Redakcio atendas de eksterl. edukistoj sufiĉan nombron da petoj. Ĉiu SAT-edukisto konsciu sian devon en tiu momento, kiam esp. estas forte antaŭenpuŝata en div. edukistaj medioj (Vojo de Klerigo, Intern. Oficejo de Eduk., Esp. sekretario ĉe Brita Instr. Lab. Ligo, Pedag. Tagoj de Edukintern en Leipzig). Postulu de la red. la esp. resumon k. deklaru vin preta, subteni la revuon per eksterl. eduk. artikoloj. Adr.: **Minsk, Plac Voli, Narkomasjveti, Redakcio de ASJVETA.**

Kiu volas ricevi unuamajan saluton?!

Se via lab. aŭ kom. organizo, ankaŭ ĵurnalo, opinias esp-on netaŭga ilo por la internaciaj rilatoj, kaj vi neniel povas ŝanĝi tian opinion nek instigi la organizon unue skribi esp-lingve eksterlanden, bonvolu sciigi al ni senprokraste ties adreson laŭ kiu Ĉita'aj Distriktaj Lab. k. Kom. Organizoj sendos sian kolektivan unuamajan salutleteron, oficiale subskribitan kaj sigelitan. Oni skribu: Ĉita (Siberio), poŝtkesto n-o 1, al SAT-grupo.

SAT-anoj!

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

ENHAVO:

	pago
Krizo en la "ora lando"	211
Fama patriotkadavrejo: Verdun .	212
Ibn Seud	212—13
Faktoj sen komentoj	213
La disvastigo de la biblio . . .	213—14
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo	213—14
Semajno el mia vivo	214
Kongreso de Edukintern en Leipzig	214
Tra Esperantio	215—18
Anoncoj, Korespondado	217—18

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)